

Kara Doktoro,

Mi iom hezitas por skribi al vi ... ĉar mi bone scias ke pli au<sup>2</sup> malpli frue vi respondos... + eble tio malplaĉos al vi.

Tamen, mi ne povas lasi vian P.K. sen respondo. + ĉar estas jam decidita afero ĉe ni ambaŭ, ke mi ĉiam donas pli ol mi ricevas, mi riskas vian malplaĉon + skribas.

Mi ofte pripensas al vi + parolas pri vi. Mi multe bedaŭris ke vi ne estis en Ĝenevo. Mi havis multan liberan tempon ĉar kiel advokatedzino, la "famaj" oratoroj de la Somera Universitato tute ne kontentigis min + mi promenis post la ĉeestado nur de kelkaj kunvenoj.

Mi interkonatiĝis kun korespondanto mia el Miskolc (Hungarujo). Sed li estis tre timema kvankam multvalora homo + ne kuraĝis multe paroli kun mi. Li diris ke mi estis ĉiam tiel ĉirkaŭata<sup>3</sup> ke li ne povis alproksimiĝi. Mi vidis multajn antaŭajn konatulojn + faris novajn, ke tio estis iom prave. Plie, lia edzino kiu estas kamparino<sup>4</sup> ne flue parolas Esp. + tio ĝenis multe.

La balo ne estis sukcesa pro neglita planko + funebra orkestro. Do, von Frenekell (kun kiu mi estis dum la preskaŭ tuta Kongreso), Arnhold + aliaj + mi iris al fama kabaredo + dancis ĝis la policaro forpelis nin. Ni estis 10 kies 9 nacioj. Mi do proponis ke "ni fondu" la internacian danklubon + ni elektis kiel prezidanton, Ruson: "Dro Fulda". Mia edzo nur venis je la fino por preni min. Ni pasigis tre agrablan nokton.

Post la Kongreso L. + mi pasigis 2 semajnojn en S<sup>t</sup> Gervais, apud Chamonix en la altaj Alpoj. Belega loko, belega vetero + tre granda ĝuo.

De post nia reveno hejmen, ni estis tre okupitaj. Mi ~~prenis~~ studas paŝtelajn desegnojn + mi nun rekonstruas vidaĵojn kiujn mi skizis en S<sup>t</sup> Gervais. Tio multe plaĉas al mi kiel vi povas imagi.

La vetero de post kelkaj tagoj estas tiel belega ke vortoj ne povas esprimi ĝin. Kiam mi eliras, precipe matene, frue, mi sentas min preskaŭ ebria pro tiom da beleco. La koloroj flavaj, oraj, ruĝaj k.t.p. tra la arboj lumigitaj de la sunradioj estas tiel belaj ke oni ŝatus pentri ilin aŭ esti poeto por laŭdi ilin. Sed ne ĉiuj estas poetoj - oni devas nomiĝi Fousek + trovi azurean<sup>5</sup> polveron por tio.

La domo kiun vi sendis el Hora Kutná ŝajnas tre bela + malnova. Sed kie estas Hora Kutná? Mi ne povas trovi iun ajn urbon vian en landkarto pro la terura ĉeka skribo. Grandan dankon pro via memoro. Ankaŭ danku la S<sup>ron</sup> kiu skribis "pro memoro de Viena Kongreso" + kies mi ne povas legi la nomon.

Edinburgo! ĉu multaj iros? ĝi estas tiel malproksime + tiel multekoste<sup>6</sup>. Mi esperas iri. D<sup>ro</sup> Broder ne estas en Ĝenevo sed intencas iri al Edinburgo - sed mi dubas + mi ne kredas ke li iros. La Pola ekonomia stato estas tre malbona + ĉiuj plimalriĉiĝas tagon al tago. Li invitis min al Varsovio 1927. Sed mi ne pensas ke ni iros al Danzig. Tro malproksime.

<sup>1</sup> manskribita noto: zodp. 12/10 25

<sup>2</sup> aŭ

<sup>3</sup> ĉirkaŭata

<sup>4</sup> ĉu "kamparanino" ?

<sup>5</sup> ??

<sup>6</sup> aŭ "multekosta" ?

Privat, kiel kutime, parolis mirinde en la 17a. Li klarigis la Ligon de Nacioj en la Palaco mem + ĉio estas intense interesa.

Mi tute ne rekonis "Ginevra". Mi, kiel vi, vidis ĝin en Bern. Oni forprenis unu akton + neniu rekonis ĝin.

Mi estis, la plej multan tempon, kun Sofio + Lelio<sup>7</sup> Zamenhof en Ĝenevo. Sofio kiun vi eble vidis, dikiĝis terure. Ho, ne, ŝi ne estis en Bern + vi neniam vidis ŝin.

*Margene:*

L. al vi sendas siajn tutkorajn salutojn. La Tribunalo malfermiĝis la 2<sup>an</sup> + la festeno de advokatoj okazis hieraŭ.

Nun, mi finas, sed antaŭe, mi volas diri al mia neniam forgesita korespondanto ke liaj P.K. ĉiam donas la saman plezuron + ke mi ofte pripensas + revivas la Prahajn tagojn. Eĉ, tiun-ĉi matenon, mi parolis al Lucien + citis vin pro io ajn + mi diris: "Ho! ne estas kiel Fousek kiu devigis min trairi ponton + stratojn sub varmega suno + mi montris al li tramveturilon, petante ke ni prenu ĝin + ĉiam Fousek respondis: "Ni atingos baldaŭ la celon, ni alvenos baldaŭ" Mi aldonis: "Kia stranga kutimo estas pagi monerojn por trapasi ponton". Vi do vidas ke ĉio estas ankoraŭ tiel freŝa en mia memoro.

Mi trarigardis de nove la albumon de Praha + ĝiajn belajn vidaĵojn - en ĝardeno kie staras monumento - en ĝardeno kiu supreniras. Kia bela urbo Praha! Mi neniam forgesos la 7 pontojn + la Moldavan + la Repr. Domon.

Atendante ĝin vidi de nove, mi kore salutas vin, vian edzinon + kisas Eveton. Kia aĝa ŝi estas nun? Mi esperas ke ŝi fartas bone.

Do, bonan vesperon. Mi atendas amikojn por ludi biliarde + mi devas ludi kun ili.

Ĉiam samideane + tutkore

Alice Sergeant

---

<sup>7</sup> ĉu "Lidia" ??